

Pri la rilatoj inter Louis de Beaufront kaj Carlo Bourlet,
laŭ Marcel Delcourt kaj Jean Amouroux
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 696, 1977.02.09 & 11 & 12

Cl.- Parolas Claude Gacond. Dum la du pasintaj semajnoj ni citis al vi erojn el artikolo pri la enigma markizo Louis de Beaufront, kiu fakte estis ne nobelo, sed eksterleĝe naskita. Lia vera nomo estis Louis Eugène Chevreux, lia patrino nomiĝis Louise Armand Chevreux kaj lia patro Courtenay. Tiu ĉi studo de Tazio Carlevaro aperis en Literatura Foiro en junio 1976. En decembro 1976 Literatura Foiro aperigis la komencon de alia historia studo pri la pseŭdo-markizo Louis de Beaufront, siatempa papo de Esperanto, sub la titolo 'Fino de mito, grandeco kaj dekadenco'. El tiu ĉi studo ni citas al vi erojn, kiuj raportas pri la rilatoj inter Louis de Beaufront kaj Carlo Bourlet:

«La 15-an de januaro 1901 esperantiĝis Carlo Bourlet, brila scienculo, membro de la teknika komisiono de la potenca Franca Touring-Klubo. Jam la 1-an de februaro de Beaufront skribis al li petante lian intervenon, por ke Franca Touring-Klubo konsentu nomi delegiton por la antaŭ nelonge fondita Delegacio por Alprenado de Internacia Lingvo.

La korespondado inter de Beaufront kaj Bourlet estis tre abunda en la intertempo de tri jaroj, 1901-1903. La markizo gvidis la unuajn lingvajn paŝojn de la alia, lin instigis anstataŭi Moch kiel prezidanton de la pariza grupo kaj fariĝi membro de la Societo por la Propagando de Esperanto. Flame kaj efike Bourlet sin lanĉis en la batalon: li interesis la Francan Touring-Klubon pri Esperanto, kaj eĉ sian propran eldoniston, la gravan Hachette, kaj li peris la kontraktojn de Beaufront - Zamenhof - Hachette, strukturis kaj tre potencigis la parizan grupon. Li senlace propagandis uzante la profesiajn kaj amikajn rilatojn sur la tuta teritorio, tiel ekflorigante multnombrajn Esperanto-grupojn.»

Kiel montras la aŭtoroj de tiu ĉi historia studo, sinjoroj Marcel Delcourt kaj Jean Amouroux, Louis de Beaufront ne estis tre fidinda advokato. Jen kio reale okazis koncerne la kontrakton Hachette - de Beaufront - Zamenhof. Ni citas:

«Nur en junio 1902 Carlo Bourlet havis la okazon tralegi la kontraktojn subskribitajn en julio/aŭgusto 1901, ligantajn de Beaufront, Zamenhof kaj Hachette. Finance ili estis tre malfavoraj al Zamenhof, sed tre profitaj al de Beaufront. Bourlet komencis persekuti de Beaufront kaj agadi ĉe Hachette ĝis kiam la kontraktoj estis anstataŭitaj per novaj, pli favoraj al Zamenhof, kompreneble je la malprofito de De Beaufront.»

Tio klarigas, kial la rilatoj inter Carlo Bourlet kaj Louis de Beaufront akriĝis kaj difektiĝis. Jen alia ekzemplo de la nefidindeco de Louis de Beaufront:

«La unua vortaro Esperanto-Franca, kvankam aperinta kun la nura subskribo de de Beaufront, estis reviziita de Carlo Bourlet, kiu mem subskribis ĉiun presprovaĵon. Bourlet poste plendis pro nedankemo, ĉar de Beaufront ĉiam silentis pri lia grava helpo. Post tio la rilatoj inter Louis de Beaufront kaj Carlo Bourlet kulmine difektiĝis. Bourlet akceptigis novan statuton por la Societo por la Propagando de Esperanto, kiun fondis Louis de Beaufront. Ĝi fariĝis Societo Franca por la Propagando de Esperanto, kio signifas, ke ĝi perdis sia tutmondan resonon. Kaj la aniĝoj ne estis plu individuaj, sed pere de la Esperanto-grupoj. Tiam finiĝis la lingva monopolo de de Beaufront, kun la franca epoko stompiĝis la mito pri ĉiopoveco de de Beaufront.»

Profesoro Théophile Cart juĝis klarvide, kaj tio jam en 1901, la diferencon inter la lingva gvidado de Zamenhof kaj de de Beaufront. Jen citado el letero al Bourlet, 18-an de decembro 1901:

« Kion mi riproĉas al s-ro de Beaufront estas, ke li malgrandigas la liberecon kie ĝi nenion endanĝerigas ĉar ĝi ne malhelpas la klarecon sed, ĉefe, kio timigas min ĉe li estas bedaŭrinda emo, kiu neniam troviĝas ĉe la vera klerulo kaj malofte ĉe la valora homo, neniam sincere konfesi faritan eraron. Kie Zamenhof diris: «ne gravas, faru laŭplaĉe!» li diris : «jen kiel oni devas diri laŭ Zamenhof ». Li difinis regulon kaj kiam estas kontraŭdiro li ne konsentas pri la kontraŭdiro sed deziras ĝin ekspliki kaj tial li diras enormajn stultaĵojn. Kaj estas li kiu ilin diras kaj ne Zamenhof kiu ja kulpis pro neprecizigo sed kies neprecizigo estas ofte dezirata ĉar li konsideras ke pri tio decidus la uzo.»

Vi aŭdis el Svislando erojn el artikolo titolita ‘Fino de mito’ aperinta en Literatura Foiro en decembro 1976 kaj verkita de Marcel Delcourt kaj Jean Amroux. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*